FN PER ANC 47

Bôjan Kristnaskon
kaj bondezirojn por 2007 - Precipe bonan sanon
Petro Kiĵo

n° 229 DECEMBRO 2006



# ESPERANTO NORMANDA BULTENO

## ESPERANTO-NORMANDIE

Redaktas: Pierre QUILLAUD 16, rue Lt Vaisseau Paris
76120 LE GRAND-QUEVILLY Tel. 02 35 69 66 09
Abon-Kotizoj: 8 Eŭroj Esperanto-Normandie
CCP 283 - 40 H ROUEN

## DERNIER BULLETIN

C'est en effet le dernier bulletin de l'année 2006
Mais comme je vous l'annonçais dans le numéro de septembre, c'est aussi le dernier fait par moi.

Le premier bulletin de mars 2007 sera fait par le comité de rédaction du groupe d'Hérouville Saint Clair . Je transmettrai les archives du bulletin normand à ce groupe; je ne les possède pas toutes. Les plus anciens bulletins en ma possession remontent à 1972. Auparavant, je crois qu'il existait un lien qui s'appelait "Normanda stelo".

En feuilletant les archives , je me suis rappelé que les anciens rédacteurs furent : M. Jouis du groupe de Rouen, Pierre et Maryse Lemarchand de 1974 à 1977, Claudine Pottier jusqu'en 1980 , Jean Gibeaux jusqu'en 1984, Annie Gaillard jusqu'en 1987, Yves Nicolas jusqu'en 1992. Je suis devenu le rédacteur à partir du N° 175 de novembre 1992, c-a-d-, depuis 14 ans. Au début, les bulletins étaient tapés à la machine sur un stencil et reproduits par ronéo. La reproduction par photocopies et l'utilisation de l'ordinateur ont facilité le travail et bien amélioré la présentation du bulletin. Pendant plusieurs années, P. et M. Lemarchand ont procédé à sa reproduction et à l'envoi.

Pourquoi le bulletin ?

-Etablir un lien entre les différents groupes et les isolés de notre région.
-Donner les informations qui permettent d'utiliser la langue : congrès nationaux et internationaux, stages de perfectionnement, centres de vacances, visites de conférenciers étrangers, assemblées régionales, rencontres inter-groupes, abonnements aux magazines, adhésions aux associations , etc... Pour ceux qui sont impliqués dans la vie du mouvement espérantiste, ces informations sont déjà connues mais beaucoup , et surtout les débutants ne lisent que notre bulletin. Pour le moment, ce lien est l'activité principale de notre fédération.

Quelle est la tâche du rédacteur ?

Taper les articles envoyés par les adhérents.
Eventuellement les corriger (erreurs grammaticales) Les résumer ou les raccourcir si nécessaire. Puiser des informations d'autres sources. Faire la mise en page. Aller dans une imprimerie pour la reproduction. Plier, mettre sous enveloppes, coller les étiquettes-adresses et les affranchir.

Quels articles envoyer au rédacteur ?

Informations sur la vie des groupes locaux. Impressions de congrès, de voyages. Tous sujets pouvant intéresser les lecteurs en évitant les sujets polémiques . Pas d'articles politiques sauf en cas d'attaque contre l'Esperanto.

Articles en français ou en espéranto?

Notre bulletin doit être bilingue pour être compris des débutants. Les articles en français doivent avoir rapport à l'Esperanto. Si nécessaire et à la demande, ils peuvent être traduits par le rédacteur.

Aliaj geamikoj prizorgos nian ligilon kaj verŝajne plibonigos kaj plibeligos ĝin. Mi deziras al ili bonan sukceson kaj mi memorigas ke nia bulteno estas ĉies ; tio signifas ke ĉiuj membroj de nia asocio devos helpi ilin sendante materialon kaj interesajn artikolojn

Petro KIĴO

## TURNEO TRA FRANCIO

En la ĵus pasinta printempo, laŭ invito de francaj esperantistoj, mi faris turneon tra la nord-okcidenta parto de Francio. Min gastigis kluboj kaj grupoj en pli ol dudek urboj. Dum mia ne ĉiam facila vojaĝo mi traveturis aŭte kaj trajne preskaŭ kvar mil kilometrojn nur ene de Francio. Ankoraŭ kelkajn semajnojn post la hejmreveno mi ĉiunokte inkubsonĝis, ke mi ankoraŭ veturas, veturadas kaj mi vekiĝis en malvarma ŝvito. Do, preskaŭ ĉiutaga ŝanĝo de la urboj, dormloko, ĉirkaŭantaj min homoj kaj pakado de valizoj iĝis dum tiu ĉi monato por mi nepraĵo, kiel purigado de dentoj.

Mi disponigis kelkajn prelegtemojn, sed la ĉefa temo pri kiu interesiĝis la Francoj , estis Taĝikio; do mi prelegis pri mia devenlando. Evidentiĝis ke la plejmulto de la Francoj havis pri ĝi neniun imagon kaj multon demandis pri la lando ankaŭ post la prelegoj. Aparte gejunuloj, studentoj kaj liceanoj, havis multajn kaj profundajn demandojn. Esperantistoj ĉie (escepte de unu klubo) simultane tradukis la tutan prelegon por neesperantistoj kaj komencantoj.La klubo en la urbeto Hérouville krom tio aranĝis publikan legadon de miaj rakontoj en la urba biblioteko kun postaj demandoj de la sufiĉe multnombra ne nur esperantista publiko. Ankaŭ la aktoroj, voĉlegantaj la tekston, ne estis esperantistoj. Por tiu ĉi vespero la "heruvilaj"legemuloj perfekte prepariĝis : jam en antaŭaj monatoj, ili tradukis en la francan kelkajn miajn rakontojn.

Aliaj kluboj preferis aldone al la ĉefa temo kantadon : do ni kantis kune kantojn en esperanto, aŭ mi sola kantis por ili. Almenaŭ ĝis kiam mi havis la voĉon. En la meza parto de la turneo oni ekster la plano kaj sen demandi min tiel densigis la jam sufiĉe streĉan programon, ke mi devis prelegi ĉiutage eĉ du foje tage. Tio tute ne plaĉis al mia voĉo, kiu komence raŭkis kaj poste preskaŭ malaperis.

Min persone mirigis kaj kortuŝis la fakto, ke en kelkaj kluboj mi vidis malnovan konaton, mian libron "La Bato", kiun esperanto-lernantoj uzis kiel lerno(lego)libron.

Aparte impresis min , dum la tuta vojaĝo entuziasmo kaj respondeca preskaŭ profesia prepariĝo de multaj esperantistaj grupoj kaj grupgvidantoj al mia alveno. Ĝi preskaŭ ĉie estis anoncita en lokaj gazetoj kaj krome ili preparis - en ĉiu urbo alian-, allogan reklamfolion, kiu estis metita je dispono en bibliotekoj, kulturorganizaĵoj, vendejoj aŭ simple algluita al la montrofenestroj, tiel ke ĉiu povis legi la informon. Tiel, oni kutime faras kun gastprelegantoj, klarigis al mi la esperantistoj

Kiel rezulto de tia bonega reklamo por esperanto okazis foje , ke post mia prelego unu-du personoj el la publiko alparolis la kursgvidanton, dezirante lerni Esperanton. Precipe junuloj, liceanoj kaj studentoj, ne longe pensis, ĉu indas aŭ ne indas lerni Esperanton. Kaj tio, kompreneble, estis la plej bona rekompenco de ĉiuj miaj klopodoj kaj streĉoj.

Lena KARPUNINA

*Lena vizitis la grupojn de Le Havre, Rouen, Herouville ĉe la komenco de sia turneo , antaŭ laciĝo kaj pro tio, ĉiuj estis kontentaj pro ŝiaj prelegoj. Ŝi estas esperantista verkistino kaj mi rekomendas al ĉiuj legi ŝian libron : "La Bato" kiu estas tre interesa kaj facile legebla. Ofte lernintoj kiuj deziras perfektiĝi petas : Kiun libron vi konsilas al mi ?*
*Senhezite aĉetu "La Bato" ĉe la* ***Libroservoj de " Esperanto-France"kaj de SAT-Amikaro***
*Esperanto - France 4bis rue de la Cerisaie , Fax ; 01 42 780847 aŭ per- reto : butiko@esperanto-france.org*
*Libro servo de SAT-Amikaro ĉe : B.Schneider 38 Avenue de la République 94320 Thiais*
*La libro kostas 12,50 Eŭroj (+sendkostoj 20%) Profitu la okazon por peti la kompletajn katalogojn de tiuj libro-servoj por la jaro 2007*

************************************************************************************

**MI DEZIRAS KORESPONDANTON !**

Kontaktu : Koresponda Servo Mondskala ĉe Sro François Xavier Gilbert 33 rue Louvière 55190 Void-Vacon
Sendu al li 2 internaciajn respondkuponojn
Donu jenajn informojn : Familia nomo,- Persona nomo,-Viro aŭ virino,- Edz(in)o : jes/ne,-Aĝo,- Profesio,-Scio de Esperanto : bona, meza, iometa,- Kompleta, klare skribita adreso,- Dezirata nombro da korespondantoj,- Preferata sekso, aĝo,- Preferata(j) lando(j),- Deziritaj temoj,- Retadreso (se vi havas).
La adresoj estu tre legeble skribitaj, prefere preslitere

**BONAN KORESPONDADON !!!**

# PARTOPRENU KONGRESOJN DUM 2007 !!!

Ni jam povas informi vin pri la kongresoj kiuj okazos dum venonta jaro :

LANDAJ KONGRESOJ :

-

**Kongreso de ESPERANTO FRANCE** : La Interasocia Kongreso okazos en BOURG en BRESSE. La Esperanto - Grupo de Bourg en Bresse, kun helpo de federacianoj de Rodanalpa regiono kaj de Burgonjo, akceptis organizi la interasocian kongreson de la 25a ĝis la 29a de Majo (Pentekosta Semajnfino) . Ni povos certe ĝui je tre favoraj kondiĉoj dank'al la sperto de Rodanalpanoj por organizi buntajn kongresojn en formo de festivaloj. Fine de Decembro, vi povos peti aliĝilon kaj ĉiujn informojn al Esperanto-France

**Kongreso de SAT-AMIKARO :** Ĝi okazos en ARTIGUES -près- BORDEAUX (ĉirkaŭurbo de Bordozo) en Domo por Socia Promociado (Maison de la Promotion Sociale) , taŭga loko por akcepti grandegajn grupojn de la6a ĝis la 10a de Aprilo (Paska Semajnfino)Surloke eblos tranokti en 190 dormoĉambroj, unu,du aŭ trilitaj. Unulita ĉambro kostos26 Eŭroj, dulita kostos 32 E, kaj trilita nur 24 E. Domveturiloj kaj ruldomoj rajtos parki surloke. Restoracio kapablos gastigi 350 personojn en agrabla kaj kvieta kadro . Ĝi funkcios ĉu memserve ĉu tradicie . Pri la prezoj, proksimume:
25 Eŭroj sufiĉos por la tri ĉiutagaj manĝoj. Surloke staras multaj kunvenĉambroj . Vasta kaj moderna amfiteatro kun 250 komfortaj seĝoj akceptos ĝeneralajn kunvenojn, prelegojn kaj ankaŭ distrajn vesperojn.(Jomo kaj liaj muzikistoj, Fabrice Morandeau, Georgo Handzlik ktp...) . Vizito al centro de Bordozo per la nova tramo. Ekskursoj al Arkaŝongolfeto kun promenado per ŝipoj. Ekskurso al vinberejoj (Entre-Deux-Mers, Médoc) . Specialaj aranĝoj por la infanoj. Petu aliĝilon ĉe SAT-Amikaro 132/134 Bvd Vincent Auriol 75013 Paris

INTERNACIAJ KONGRESOJ :

**UNIVERSALA KONGRESO (UEA)** ĝi okazos en Jokohamo Japanio de la 4a ĝis la 11a de Aŭgusto
La peranto en Francio estas Esperanto-France kiu verŝajne organizos karavanon.

**Kongreso de Sennacieca Asocio Tutmonda** : ĝi okazos en Francio, sude de Parizo, en Chatenay Malabry de la 21a ĝis 28a de Julio.Kontaktadreso Ansofo Markov 61 Bvd Vauban 78180 Montigny le Bretonneux
Rete : vinkomarkov@yahoo.fr

**59a INTERNACIA FERVOJISTA ESPERANTO KONGRESO :**
Ĝi okazos en Parizo de la 12a ĝis la 19a de Majo 2007

Aliaj kongresoj, renkontiĝoj, staĝoj estos anoncataj en venontaj bultenoj.
**Nepre rezervu tiujn datojn**
*************************************************************************************

***Por la aranĝoj organizotaj de niaj propraj grupoj, ne forgesu ke ni multe voĉdonos***
***en Francio : Elections Présidentielles : 22 Avril et 6 Mai***
***Elections Législatives : 10 et 17 Juin***
*************************************************************************************

**AŬSKULTU RADIO ELSENDOJN EN ESPERANTO**

.....kaj skribu al tiuj radioj por ilin gratuli kaj elmontri ke ili havas multajn geaŭskultantojn .

UN TRES GRAVE EVENEMENT :
Radio Varsovie est très bien reçu l'après-midi à 17 h sur 6050khz 49,58 m
le soir, à 22 h sur 7290 khz 41,15m
Ili perfekte parolas Esperanton, informas pri Pollando, pri la mondo kaj pri la esperantajn eventojn. Tiuj elsendoj tiel gravaj por Pollando kaj por la esperantistoj malaperos pro nesufiĉa reago de la esperantistoj!

Vi povas kaj devas helpi . Estas urĝa afero, Skribu, petu informojn, aŭ simple salutu al :

Radio Polonia - Esperanto Redakcio
Skryrka 46, PL 00977 Warszawa , Pologne (uzu poŝtmarkon da 0,60 Eŭeo)
Per interreto :< esperanto@polskieradio.pl>

Vi povas ankaŭ franclingve skribi al Pola Ambasadejo por peti ke ili helpu al daŭrigo de esperanto-elsendojn :
Ambassade de Pologne
1 rue de Talleyrand , 75007 Paris

## COTISATIONS 2007 DES ASSOCIATIONS NATIONALES ET INTERNATIONALES DU MOUVEMENT ESPERANTO

Apprendre la langue, c'est très bien ! Mais il faut aussi soutenir les associations qui militent en faveur de notre idée . Il faut aussi se perfectionner et enrichir son vocabulaire en lisant les revues et magasines : donc abonnez vous !

UNIVERSALA ESPERANTO ASOCIO
avec le Jarlibro et l'abonnement à la revue " Esperanto " : 57 Euros (sans la revue 23 Euros)

ESPERANTO - FRANCE (UFE)
avec la revue " Le Monde de l'Esperanto" : 55 Euros (sans la revue : 33 E)
Abonnement à la revue pour les non-adhérents :30 Euros

ESPERANTO - JEUNES (JEFO)
avec la revue "Jeunesperanto" 30 Euros (pour étudiants et chômeurs :15 E)

Les cotisations sont à régler à Esperanto-France , 4 bis rue de la Cerisaie 75004 Paris CCP 855 35 D Paris
Si vous désirez adhérer ou vous abonner, demandez au préalable un bulletin d'adhésion à Pierre Quillaud

*******************************************************************************

SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA (SAT)
avec la revue " Sennaciulo " 52 Euros
à régler à SAT - Peranto CCP 17333 10 N Paris
Envoyez votre chèque à Pierre Quillaud 16 rue Lieutenant Vaisseau Paris 76120 Grand Quevilly

SAT-AMIKARO
avec la revue mensuelle "La Sago": 34 Euros
abonnement à la revue pour les non-adhérents : 31 E
Cotisation à régler à SAT Amikaro 134 Bvd Vincent Auriol 75013 Paris CCP 37852 90 L La Source

*******************************************************************************

ESPERANTO - INFO :
Revue trimestrielle d'information en français sur la langue internationale
Abonnement simple 20 E (de soutien 30 E)
Esperanto-Info Col de Coperlac Mas Saint Chély 48210 Sainte Enimie CCP 11901 46 B Marseille

*******************************************************************************

EUROPE DEMOCRATIE ESPERANTO

Le montant de la cotisation annuelle est libre sous réserve d'un minimum de 10 Euros. Il est conseillé d'adapter sa contribution annuelle en fonction de ses ressources. Cotisants non imposables : 15 E. Smic: 50 E . Au delà en fonction du revenu mensuel net.
Chèque au nom de "AF-EDE France " à envoyer à Marc Anselmi 1 rue aux Foulons apt 5 , 62000 Arras

*******************************************************************************

**ALIAJ ABONOJ:**

| | |
|---|---|
| HEROLDO DE ESPERANTO | 36 E (17 N° par an) |
| KOMENCANTO (international de Russie) | 18 E ( 4 N° par an) |
| KONTAKTO (TEJO) | 22 E ( 6 N° par an) |
| LA KANCERKLINIKO | 22 E (5 N° par an ) |
| LA ONDO DE ESPERANTO (Russie) | 32 E (11 N° par an ) |
| LITERATURA FOIRO | 33 E ( 6 N° par an) |
| LITOVA STELO | 14 E ( 6 N° par an) |
| MONATO (Internacia magazino) | 46 E (11 N° par an) |

Pagu viajn abonojn pere de Esperanto - France 4 bis rue de la Cerisaie 75004 Paris
info@esperanto-france.org Tél. 08 717 718 33

**NOVJARAJ DONACOJ :**

Mendu librojn por donaci al viaj geamikoj:

- Huit ans autour du monde (270 pages, 45 photos, 20 Euros) (franc-aŭ esperantlingve)
- Sur les sentiers des Carpates (240 pages, 70 photos, 20 Euros)
- Compostelle (200 pages, 75 photos, 18 Euros)

Remise : 8% pour 2 livres, 10% pour 3 livres . Frais de port : 1livre=4 Euros, 2 livres=4,50 E, 3 livres=5,90 E
Contactez : Bruno et Maryvonne ROBINEAU, Le Moulin Boireau 49270 Landemont.
Tél. 02 40 98 78 76 Courriel : brobineau@wanadoo.fr

*****************************************************************************

## ĜEMELECO INTER MALSUPRA SAKSIO KAJ NORMANDIO

Mi memorigas al vi ke esperantistoj de Malsupra Saksio (regiono de Hanovro ) deziras rilati kaj starigi ligilojn kun partnera regiono, Normandio. Ekzemple, ili sugestis eldoni unu. aŭ dufoje en la jaro komunan bultenon.

Jen alia propono de Thomas Heberlein el Hameln :

EMAS, la landa asocio de Malsupra Saksio planas propran retpaĝon. Do mi invitas vin kontribui teksto(j)n kaj eble bildo(j)n pri Esperanto, via regiono Normandio aŭ pri Esperanto en Normandio por publikigi ilin kadre de la estonta retpaĝo de EMAS (Esperanto en MAlsupra Saksio) Kontaktu < emas@esperanto.de >

*****************************************************************************

## ENMARAJ HIDROKARBIDOJ

Oni ofte aŭdas prave amarajn kritikojn, kontraŭ la ŝipestroj kiuj, pro monŝparo, krime enmaren elverŝas la reziduojn de purigado de la cisternoj de siaj petrolŝipoj. Oni ankaŭ emociiĝas kiam ŝippereo okazigas impresan nigran tajdon sur strandojn kaj rokecajn marbordojn.

Sed tiuj du policiigaj faktoroj de maroj per hidrokarbidoj ne estas la nuraj. Laŭ studo de la "National Academy of sciences of Washington ", la diversaj fontoj de enveno en marojn de hidrokarbidoj estis jenaj en 1975, kun ilia jara kvanto je milionoj da tunoj, kaj respektivaj gravecoj :

| | M.t | % |
|---|---|---|
| 1)-Alportaĵoj de riveroj pro surteraj homaj aktivecoj | 1,90 | 31,1 |
| 2)-Enmaraj purigadoj de cisternoj de petrolŝipoj | 1,33 | 21,8 |
| 3)-Forĵetoj de marbordaj petrolaj instalaĵoj (rafinejoj...) | 0,80 | 13,1 |
| 4)-Refalaĵoj de atmosfero (industrioj, transportoj,...) | 0,60 | 9,8 |
| 5)-Natura ŝvitado de submaraj petroltavoloj tra la supraj geologiaj tavoloj | 0,60 | 9,8 |
| 6)-Akcidentoj de petrolŝipoj | 0,20 | 3,3 |
| 7)-Likaĵoj de enmara produktado | 0,08 | 1,3 |
| 8)-Aliaj homaj aktivaĵoj | 0,60 | 9,8 |
| | 6,11 | 100,00 |

Krome, naturaj procezoj de organika putriĝo jare produktus (?) egalan kvanton da hidrokarbidoj kiuj fine versiĝus en la marojn. Pro la nura ĉi-supra fonto n°5, kiu ekzistas de la karbonia periodo, la tuta surfaco de la maroj de la planedo, devus esti kovrita de petroltavolo da 61 cm, se la naturo ne kapablus per kemiaj kaj biologiaj rimedoj detrui hidrokarbidojn.

Tio kompreneble neniel devas nin instigi esti lozemaj rilate la homaj fontoj de marpoluciado per hidrokarbidoj, sed tamen povas nin iom kvietigi pri la ebla resaniĝo de maroj kiam ni estos haltintaj ilin kloakigi.

Henri ROUSSEAU

*****************************************************************************

**TURISMO KAJ ESPERANTO**

Niaj geamikoj el Le Havre prizorgas la Gvidilon "Turismo kaj Esperanto
Konsultu " www.gvidilo.org "Vi tie trovos ĉiujn lokojn kie esperanto estas uzata tra la mondo : kulturajn lokojn, gastigadon, restoraciojn, amaskomunikilojn, lokajn vidindaĵojn kaj ĉiun ajn lokon rilatanta al esperantista kulturo kaj turismo. Ili petas vian helpon por alĝustigi aŭ kompletigi tiun gvidilon

**KAJ NUN LA KASISTO :**

N'oubliez pas de regarder si votre nom figure dans la liste des cotisants. S'il n'y est pas c'est que je n'ai pas reçu votre abonnement-cotisation.

Il m'a fallu adresser une circulaire de rappel à ceux qui devaient un an ou deux. Le bulletin peut être envoyé gratuitement à ceux qui ont des difficultés.... à condition qu'on me le demande.

*Je ne serai plus rédacteur du bulletin* *mais je reste trésorier* jusqu'à la prochaine Assemblée Générale.

Petro KIJO

**LISTO de KOTIZINTOJ por 2006**

Rigardu ĉu via nomo aperas en ĉi-suba listo :

Bataille, Bessière, Bonnet, Caron, Chalm, Colbert, Corrieu, Defrance, Domingo, Dubois, Dubuc, Dufeu, Dufossé, , Dufresne, Duval, El Bahri, Erhard, Esp-Cotentin, Evrard, Freslon, Gibert, Guéroult, Guerre, Guilmot, Hébert, Helbert, Hubert, Huet, Jean, Jourdaine M.L., Jouvin, Klein, Lamy, Langeois, Lardeur, Le Bever, Lebrun, Lecouvreur, Leguillon, Lehéricey, Lemarchand, Leprévost, Leroy, Lesueur, Lévesque,Lévy, Loisel, Longuet, Magerel, Mary, Michaud, Millet, Moyon, Nardin, Nicolas, Paumier, Pottier, Poupinet, Quillaud, Rauch, Rolland, Rousseau, Rousseau-Pellico, Robiolle, Schertzer, Sénécal, Séry,Tailpied, Tanguy, Touileb, Turmel, Zilliox

*Mi jam ricevis 26 kotizojn por la jaro 2007*

Se via nomo ne estas en tiu listo, bonvolu ne prokrasti la pagon de via abonkotizo. Tiel vi helpos la kasiston kiu ne deziras sendi al vi admonleteron !

*************************************************************************************

## NIA VIVO EN ROUEN :

**GRANDA SUKCESO** por la spektaklo STIL-EKZERCOJ (Exercices de style de Raymond Queneau) ludita sole de Henrri de Sabates ( teatra nomo de Sébastien Erhard ) : unua spektaklo de la kultura sezono de la Maison de l' Université en Rouen. Malgraŭ organizmalfacilaĵoj, nesufiĉaj informiloj, manko da tempo, spektaklo en " ekzotika" lingvo (por ne-esperantistoj), sen reklamo en loka gazeto, la amfiteatro estis plena da 200 spektantoj ! Inter ili, estis 30 gekonatuloj de Sébastien, 20 esperantistoj (el kiuj 3 el Le Havre)
Kiuj estis la 150 aliaj ? Kelkaj jam interesiĝis pri la lingvo ekstudinte ĝin per iKurso, la libro Esperanto-Express kaj per Interreto. Verŝajne, multaj estis jam vidintaj la spektaklon franclingve kaj estis scivolemaj aŭskulti tiun lingvon eble strangan por ili.
Aliaj spektakloj kaj koncertoj okazis poste en la kadro de kultura sezono de universitato (Rentrée culturelle).
Tiu de Sébastien estis la plej sukcesa kaj venigis pli da homoj. Tion li faris senpage dum la aliaj ricevis sumon.
Resume, tio estis granda sukceso por Sébastien .....kaj por Esperanto !!!

**KURSO**

Catherine DOMINGO daŭre gvidas kurson en la librejo l'Insoumise rue Saint Hilaire à Rouen de 18a30 ĝis 20a30 marde, dufoje monate. La metodo estas traduko de mallonga literatura verketo kaj per teatraĵoj en esperanto. Se vi deziras pli da informoj pri tiu kurso, kontaktu Catherine ĉe 06 08 25 16 43

**KURSO en UNIVERSITATO** : Sébastien gvidas kurson ĉiumarde de 18h ĝis19h en " Radio Campus 101,3 FM ;
Le cours est rediffusé en même temps sur les ondes de la radio de l'Université. C'est un concept à mi-chemin entre le cours de langue et l'émission radiophonique.
Dans cette heure d'espérantofolies, animé par Sébastien, vous pourrez entendre de la musique, des infos sur la langue esperanto, des jeux, de l'humour et de la bonne humeur, un feuilleton radio bilingue.... et surtout un cours d'esperanto en direct avec de vrais élèves présents dans le studio !!!
Possibilité d'intervenir téléphoniquement pour encourager les élèves et soutenir l'animateur en appelant au studio (de préférence vers 18h50 pour ne pas casser le rythme au milieu de l'émission) en composant le 02 32 76 92 05
Il est aussi possible de venir au studio si vous êtes débutant , en prévenant d'avance Sébastien au 06 15 21 48 93
Bien sur, l'émission n'est audible que dans la régon rouennaise.

*La spektaklo kaj la radio-kurso atestas pri la vigleco de Esperanto kiu nun disvastiĝas dank'al modernaj rimedoj kaj junaj " propagandistoj" !!!*

**COURS SUR INTERNET** : Ces cours sont corrigés par des correcteurs bénévoles
Consultez le site : http://ikurso.esperanto-jeunes.org
**FINSEMAJNA LINGVA STAĜO :** La estraro studas eblecon organizi tian staĝon dum 2007

***ESPERANTO - NORMANDIE DEZIRAS AL SIAJ GELEGANTOJ AGRABLAJN FINJARAJN FESTOJN***

***ĜOJAN KRISTNASKON***

***BONDEZIROJN POR LA JARO 2007***